

PREZO: 1.- Kr.

Enstreckanta  
Kongreso 1949

9004

# MALGRANDA REVUO

Nro 4 · 1949

7a JARO

## ENHAVO:

	Paĝo
Krevigi heredelementojn, de prof. Åke Gustafsson ...	1
Goethe, de Josef Sommer .....	10
Vitus Bering, de Poul Thorsen .....	17
Tradukado .....	23
Atentigo pri Malgranda Revuo .....	25
Literaturo .....	27

*Redaktoro — Eldonanto:*  
**STELLAN ENGHOLM, HAGGE, SVEDUJO**

## MALGRANDA REVUO

aperas kvaronjare. Prezo 1 kr. (inkl. sendkoston). Jarabono 4 kr. Unuopa ekz. al eksterlando kontraŭ 3 rpk. — S. Engholm, Box 205, Hagge, Svedujo. Poŝta ĝirokonto 26 80 23. MR ne aperigas anoncojn aŭ informojn.

### Perantoj

- Aŭstrio: Eldonejo "Tramondo", Neutorgasse 9, Wien I.  
Belgujo: Flandra Esperanto-Instituto, P. van Humbeekstr. 3, Brusel W.  
Brazilo: Sro Jozefo Joels, Caixa Postal 2 — Lapa, Rio de Janeiro.  
Britujo: Libroservo de UEA, Heronsgate, Rickmansworth (Herts).  
Ĉeĥoslovakio: Esperanto-Asocio en CSR, Uralské Nám. 9, Praha.  
Danujo: Libroservo de CDEI, Pr. Jørgensgade 4 A, Kopenhago N.  
Finnlando: Eldono Vilho Setälä, Onnentie 23, Helsinko Kä.  
Francujo: Unuiĝo Esperantista de Francujo, 34 rue de Chabrol, Paris X.  
Germanujo: Ing. Hellmut Otto, Bamhlstr. 7, Berlin-Spandau.  
„ Sro Oscar Bünnemann, Isestr. 79 III, (24) Hamburg 13.  
Italujo: Sro Leo Costantini, Piazza Lagosta 2, Milano.  
Nederlando: Libroservo FLE, Roelantstr. 4, Amsterdam W.  
Palestino: Sro J. Kohen-Cedek, P. O. B. 7015, Jerusalem.  
Polujo: R. Sakowicz, Parafialna 3, Nova Sól.  
Svisujo: Sro O. Walder, Eigenheim, Romanshorn.  
Usono: Libroservo de American Esperantist, 114 W. 16 St. New York 11.

## MALGRANDA REVUO

Nro 4

7a JARO

1949

### Krevigi heredelementojn

de prof. ÅKE GUSTAFSSON

Antaŭ preskaŭ 2500 jaroj vivis kaj agadis sur tiu ĉi tero Pythagoras. Lia klasike bela mondbildo estis formata sur matematika fundamento. La tonoj kaj la nombroj, li opiniis, baziĝas sur la sama principo. La tero, tiu bela mondo por homoj, estas formita kiel globo, ĉar globo estas la simbolo de perfekteco. La luno, la planedoj, la steloj pendas kiel sferoj el kristalo. Malrapide turnas sin tiuj sferoj ĉirkaŭ la fajro en la mezo de la mondo. La distancoj de la ĉielaj korpoj al la tero formas harmoniajn nombrojn, kiuj respondas al la tonoj en la majora gamo. El pure matematikaj premisoj li konkludis la harmonion de la sferoj kiu plenigas la mondon per belsono ne vortigebla.

Jam antaŭ longe tiu mondbildo estis detruata. Verdire multaj nuntempaj astronomoj emas trovi sencoplenan planon malantaŭ la matematikaj formuloj de la finita universo. Ili foje parolas eĉ pri la granda plano. Sed al multaj aliaj la monda okazado ŝajnas sencenca kaj kruela. Neniu esplorfako estas tiurilate pli kruela ol la moderna biologio: la homo estas nur neperfekta ĉenero en la evoluĉeno. La evoluo estas ludo de hazardokazoj. La natura selekto, la kruela tezo de la delikatkonduta Darwin pri la supereco de la pli forta, la pli bone adaptita, estas nerefuteble forto aganta en la organisma mondo. Neniu gvidanta biologo nuntempe rekonas iun tutocan planon, originan strebadon al fiksitaj celoj. Se en la ekzisto troviĝas dia forto, ni neniam povas percepti ĝin per teraj rimedoj.

Nuntempa biologio estas konstruita sur du angulŝtonoj: unu estas la tezo de Darwin pri la evoluo de la simpla unuĉela estulo ĝis la ekstreme komplikita, multĉela homo. "The origin

of species" de Darwin havos post monato sian naŭdekjaran jubileon. La redtrovo de la leĝoj de Mendel, precize duonan jarcenton antaŭ la venonta jaro, estas la dua angulŝtono. Tiuj du okazoj ĝisfunde rekonstruis la homan mondbildon. Temas ja tie ĉi pri la vivo mem, la dukrono de la kreitaĵo, por paroli kun Falstaff Fakir.\* Mi povas trovi neniun okazon en la historio de la biologio, kiu en signifo egalas al tiuj du okazoj. Ni svedoj emas montri al la nomo Linnaeus. Li vere estis grandformata ordiganto, vojaĝpriskribanto kaj verkisto kiel ne multaj, sed lia verko neniam efikis al la mondbildo de la homoj en la sama maniero kiel la tezoj de Darwin kaj la leĝoj de Mendel. Nun estas pli vere tiel, ke multaj el liaj adeptoj, taksante tro alte la signifon de plantkolektado kaj specopriskriboj, malhelpas la evoluon de la biologio — ne nur en nia lando — kaj tiel malgrandigas lian vivoverkon.

Kiuj estas la principoj de la biologio? Unue kompreneble tiu, ke evoluo okazis. Tion neas nuntempe preskaŭ neniuj, nur iu malofla adepto de la juna Linnaeus. Sed krome — kaj tio estas la grava — ke ĉiuj cooj, egale por ĉiuj estuloj, estiĝas el kunefiko de la heredelementoj de la individuo kaj de la eksteraj kondiĉoj, en kiuj efikas la heredelementoj. Ne estas vere, kiel multaj kredas, ke la nova biologio opinias, ke la heredelementoj *destinas* la evoluon de individuo. Nerefuteble estas foje tiel, precipe kiam temas pri heredelementoj, kiuj mortigas en frua stadio, ekzemple en la embria stadio, aŭ heredelementoj kaŭzantaj certajn malsanojn, hemofilion, demenson, diversajn formojn de idioteco, sed ankaŭ en si mem tute sensignifajn ecojn ekzemple blujn okulojn. Sed ĝenerale certaj heredelementoj respondas al diversaj cooj, depende de la eksteraj kondiĉoj. Certaj heredelementoj *destinas* la evoluon de la individuoj. Plej ofte tio estas en malbona direkto. Multaj havas pli limigitan efikon, aliaj trege variajn. La medicino kreis por la homo medikamentojn, kiuj kontraŭefikas aŭ nenigas la difektan efikon de certaj heredelementoj. Ekzemploj pri tio estas insulino kontraŭ diabeto kaj tiroidekstrakto kontraŭ certaj formoj de idioteco. Oni ofte opinias, precipe inter instruistoj, ke la biologoj troigas la signifon de heredo. Kaj tamen ĉiu eco,

\* Pseŭdonimo de sveda humoristo.

laŭ ilia rigardmaniero, dependas de la kunefiko de heredo kaj medio.

Rusa plantfiziologo, Trofim Lisenko, dum la lastaj dek jaroj prezentis heredteorion, kiu kontestas la signifon de la heredelementoj. Laŭ li la okcidenta biologio estas metafiziko, kapitalisma kaj faŝisma, dum lia propra koncepto kaj samtempe tiu de la partio estas karakterizita kiel materialisma, marksisma, antifaŝisma. Oni diru kion ajn pri la trovoj kaj spertoj, kiujn prezentis la gvidantaj heredesploristoj dum la unuaj jardekoj de la nuna jarcento — metafizike transcendantaj estas la malplej taŭga epiteto. Prefere oni povas nomi ilin materialismaj, ĉar ili akcentas la materian fundamenton de la heredo. Oni nome nun pensas — post jardekoj da pacienca, ofte genia esplorado — ke la heredelementoj estas speco de grandaj molekuloj, kiuj kuŝas vicigitaj en strangaj fadensimilaj formaĵoj, t. n. kromosomoj. Ĉiu plantspeco kaj ĉiu bestospeco havas fiksitajn nombrojn da tiaj kromosomoj. La homo havas 48. Certaj protozooj havas pli ol 300, la ĉevala askarido nur 2. Tio montras rekte, ke la kromosomnombro ne decidas pri la pozicio en la evoluĉeno de iu planta aŭ besta speco. Malgraŭ la malfortaĵoj de la homo ni certe devas rigardi lin kiel pli evoluintan, kaj korpe kaj mense, ol kiom estas intestaj parazitaj kaj protozoaj. Sed estas la nombro de heredelementoj kaj ilia efikmaniero, kiuj decidas la ecojn de la genro kaj la individuo. Oni sukcesis ĉe trovi fiksitajn lokojn por la heredelementoj en la kromosomoj, kaj en konvena materialo oni povas vidi ilin per mikroskopo. Tio estas unu el la grandaj triumfoj de la biologio. Trofim Lisenko verdire deklaras, ke la heredteorioj de la kapitalista mondo estas eraraj, sed li ne kapablas forigi tiujn trovojn. La heredelementoj estas veraj materiaj unuoj. Ili havas fiksitajn lokojn en la kromosomoj. Ili efikas en kunagado kun la eksteraj kondiĉoj.

Sed kiel nuntempa biologio havas rilaton al atomoj, atombomboj? Antaŭ multaj epokoj oni konsideris la natursciencojn kiel unuaĵon kaj rigardis kiel devon de ĉiu natursciencisto lerni pri la pensoj de aliaj kaj interŝanĝi trovojn kaj spertojn. Tio komencas denove fariĝi necesa. La esploristo verdire emas esti specialisto, sed li devas esti specialisto, kiu ĉerpas scion ankaŭ el aliaj kampoj. Biologo ne povas esplori

sen kemio kaj fiziko, eventuale la plantkolektanto havas tiun privilegion, — la kruda plantkolektado estas ja en nia lando absurda tradicio de Linnaeus-adeptoj — sed tio tamen estas ne ebla al la fiziologo, la biokemiisto, la heredexploristo. Ĉe svedaj universitatoj mankas ne malmulte en tiu kunlaboro inter la sciencoj. Nia lando havas pli rigidan universitatan formon ol Anglujo, Usono kaj Germanujo antaŭ la lasta mondmilito. Laŭ mia persona koncepto tiu manko de adaptiĝo malutilas al la sveda scienco.

En 1927 eltrovis la amerikano H. J. Muller, nobelpremiito 1946, ke la heredelementoj ŝanĝiĝas, se oni priradias la seksĉelojn per rentgenlumo. Tiu eltrovo, kiu ne estis hazarda sed farata post zorgaj preparoj, kredeble estos konsiderata kiel unu el la plej gravaj en la historio de la biologio. Tuta esplorfako, la t. n. mutaciac esploro, kreskis el tiu eltrovo. Ĝi utiligas por si la modernan atomfizikon. Aliflanke ĝi montras la atom-esplorajn sekvojn kaj riskojn el la vidpunkto de la individuo kaj — kio pli gravas — el tiu de la genro. Per tiuj diversaj rimedoj la biologo provas en la laboratorio kaj sur la provkampoj imiti la evoluon, klarigi ĝian iradon. Ankaŭ en la naturo la heredelementoj ŝanĝiĝas en certa fiksita maniero kvankam tre malofte. Per rentgenradiado aŭ aliaj rimedoj oni povas plimultiigi la ŝanĝonombrojn ĝis ĉirkaŭ 5.000 aŭ 10.000 fojoj pli ol kiom ili troviĝas en la naturo. Oni do povus en la laboratorio dum kelkaj jardekoj imiti okazojn, por kies plenumo la naturo bezonis mil jarcentojn.

La atomo konsistas el densa maso, la kerno, kaj unu aŭ pluraj elektronoj, kiuj je certaj distancoj moviĝas ĉirkaŭ la kerno. La atomo estas plejparte malplena spaco. Ĝi estas sunsistemo en malgranda skalo. Ĉe la plej simpla elemento, hidrogeno, la kerno havas la mason 1 kun unu pozitiva ŝargo. Ĉirkaŭ pozitive ŝargita hidrogenkerno, la protono, cirklas negativa elektrono, partiklo, kiu pezas proksimume  $1/1800$  de la hidrogenkerno. Ĉiuj aliaj elementoj havas unu kernon, konsistantan parte el protonoj, parte el t. n. neŭtronoj, neŝargitaj hidrogenkernoj kun la maso 1. Protonoj kaj neŭtronoj estas la konstruŝtonoj en la universo. La ecoj de iu elemento dependas de la maso aŭ atomezo, kiun decidas la nombro da protonoj kaj

neŭtronoj, sed antaŭ ĉio de la atomnumero, kiun decidas la nombro da protonoj, do la nombro da pozitivaj ŝargoj en la kerno. Tiu respondas al la nombro da elektronoj, kiuj cirklas ĉirkaŭe.

La du eltrovoj, kiuj origine estigis la novan atomfizikon kaj kun ĝi la teruran instrumenton por bono kaj malbono, kia estas la urankrevigo kaj la atomenergio, estis la eltrovo de la rentgenradiado en la jaro 1895 de la germano H. Rentgen (Röntgen) kaj la purproduktado de radiumo 1898 de la franco Pierre Curie kaj lia edzino, la polino Marie Curie. La rentgenradioj havas la saman naturon kiel la lumo, kvankam nevideblaj al la okulo kaj kun multe malpli longa ondlongo. Radiumo — la radia substanco, disfalas per si mem kaj estigas je tio tri specojn de radiado: alfa-partiklojn, kiuj estas elĵetitaj kernoj de la gaso heliumo, beta-partiklojn, kiuj konsistas el negativaj elektronoj, x-radiojn, kiuj ne havas elektran ŝargon kaj kiuj same kiel videbla lumo kaj rentgenradiado havas ondnaturon sed kun grandega penetforto. Radioaktiva estas elemento, kiu simile al radiumo troviĝas ne en ekvilibro sed eligas radiadon de ia speco.

La moderna sciencisto estas alkemiisto, sed li ne plu varmigas krisolojn super ardaĵoj en mallumaj keloj, li bombardas la atomojn kaj legas la rezulton en genie faritaj aparatoj. El diversaj bombardrimedoj la neŭtronradiado akiris specialan signifon. Estas ĝi, kiu realigis la atombombon kaj obligos uzi la atomenergiecon serve al milito kaj paca laboro. La neŭtronoj estas neŝargitaj hidrogenkernoj, tial ne forpuŝas ilin elektraj kampoj. Nur kiam neŭtronoj iras rekte sur atomkernon, kiam okazas kolizio, kunpuŝiĝo de giganta forto, oni povas percepti ilian ekziston. Je la kunpuŝiĝo ŝanĝiĝas la trafita kerno, ĝi transiras en unu aŭ plurajn elementojn. Kiel ekzemplon pri la atingoj de la atomfiziko ankaŭ en la ĉiutaga laboro mi menciuj la sekvantan. Ĉe Sveriges Utsädesförening (Sveda Unuiĝo por Semgreno) en Svalöf okazas ampleksaj provoj por krevigi heredelementojn per helpo de neŭtronoj. Oni priradias diversajn semojn, en tiu ĉi okazo ĉe la Nobelstituto por fiziko en Stokholmo. Por povi mezuri la forton de la priradiado, oni samtempe kun la semoj priradias ringon de aluminio.

Unu atomo de aluminio tiam kuniĝas kun neŝargita hidrogenkerno, kaj estiĝas atomo de natrio; samtempe estiĝas heliumo. La estiĝinta natrio havas tamen pli altan atompezon ol tiu, kiu troviĝas en ordinara manĝosalo, nome 24 anstataŭ 23. Tia natrio estas radioaktiva, duono de ĝi disfalas en 14 horoj. Dum estiĝo de elektronoj kaj x-radioj ĝi poste transformiĝas en magnezion, kiu estas stabila. Tute afable kaj por helpi plantpliboniganton en Svalöf la esploristo ĉe la Nobelinstituto do tute rutine produktas natrion, heliumon kaj magnezion el kvara elemento, aluminio, kaj poste mezuras la forton de la beta- kaj x-radiado. Tiel komplikite la atomfizikisto laboras ĉiutage! Kaj li konsideras tiun mezurmetodon sufiĉe simpla.

Kiel mi ĵus menciis, la amerikano H. J. Muller antaŭ dudek jaroj montris, ke la heredelementoj ŝanĝiĝas, kiam oni per rentgenradiado priradias ovoĉelojn aŭ spermocitojn, kaj tiuj ŝanĝiĝoj estas heredaj, ili transiras al la idoj. La bedaŭrinda tamen estas, ke tiuj ŝanĝiĝoj plej ofte malutilas al la organismo, ili detruas la heredsubstancan, forkrevigas unuopajn heredelementojn aŭ eĉ grandajn pecojn de la kromosomoj. Plej ofte oni ne tuj rimarkas tion, la efiko estas kaŝita de sanaj, nedifektitaj kromosomoj. Sed en postaj generacioj kaj tute leĝofiksita ili aperas. H. J. Muller de la komenco admonis kaj ankoraŭ admonas kuracistojn kaj sciencistojn kontraŭ la difektoj en la heredelementoj, kiuj povas estiĝi ĉe junaj generakapablaj viroj kaj virinoj pro rentgena priradiado sur iliajn seksglandojn. Estas ne nur la rektaj difektoj kaŭzataj de la rentgenradioj, kaj kiuj ofte alportas grandajn suferojn, estas krome granda risko, ke niaj postuloj estos turmentataj de malsanoj kaj kriplaĵoj, kiujn ni pro malatento kaŭzis al ili, jam antaŭ ol ili naskiĝis. La heredelementoj detruigiĝas de interne, la homaro estas kavigita sub la eksteraĵo, malantaŭ la bela ŝelo estas kaŝitaj difektaj kromosomoj kaj krevigitaj heredelementoj. Nun oni ankaŭ tre singarde uzas rentgenradiadon. Protektarangoj kaj mezurinstrumentoj estas perfektigitaj, ne malplej per la sukcesa agado, kiu en nia lando okazas ĉe la Radiofizika institucio en Stokholmo.

En la estonto minacas tamen ankoraŭ pli grandaj danĝeroj. La hungara esploristo G. de Hevesy, nobelpremiito 1944 kaj

nun loĝanta en Svedujo, funde ŝanĝis la fiziologiajn mezurmetodojn. Li kaj liaj adeptoj igas best- aŭ plantokorpojn ensorbi radioaktivajn substancojn. La atomoj estas markitaj, kiel oni diras. Diversmaniere oni povas sekvi tiujn markitajn atomojn, observi kiel ili iras en la organismo, efikas en diversaj okazadoj, kuŝiĝas en diversaj korpopartoj. Tiamaniere la esploristoj sukcesis trovi sekretojn antaŭe nekapteblajn. La elemento fosforo troviĝas en senfine da organikaj substancoj kaj havas decidan signifon por la pludaŭro de la organismoj. Oni povas fari la ordinaran fosforon radioaktiva per bombardo de neŭtronoj kaj ĝi tiam ricevas la atompezon 32 anstataŭ 31. Radioaktiva fosforo en 14 tagoj disfalas je la duono kaj tiam fordonas negativajn elektronojn. Ĝi estas uzita en la medicino kiel rimedo kontraŭ certaj sangomalsanoj, ekzemple leŭkemio, tre danĝera malsano. La kuracistoj tamen ofte uzas tiom grandajn kvantojn, ke tiuj sendube difektas la seksĉelojn kun risko por la postuloj, se la kuraco okazis al generakapablaj viroj kaj virinoj. Mi povas ekzemple menci, ke la uzitaj dozoj foje estis plurmioble pli fortaj ol tiu, kiu ĉe ĝermantaj semoj de hordco kaj tritiko detruas la ĉelojn ĝis 100 %. En ĉiuj laboratorioj de la mondo oni nun ludas per markitaj atomoj. Tio povas signifi ludon pri vivo kaj morto, kaj tio povas de interne subfosi la sanon kaj taŭgecon de niaj infanoj kaj nepoj. Mi pensas pri alia formo de ludo. Dum restado en Usono antaŭ dek jaroj mi okaze trovis ludilskatolon por knaboj. Krom la ordinaraj marcelo, prenilo kaj ĉizilo ĝi entenis ankaŭ vitran ŝprucigilon kaj botoleto kun la veneno kolĉikino, substanco de aŭtuna kolĉiko, *Colchicum autumnale*, kiun la biologoj uzas por produkti t. n. gigantformojn kun pli altaj kromosomnombroj. "Let your boy produce giant flowers at will", lasu vian filon laŭplaĉe fari gigantflorojn, estis la kovrila teksto. Felice tiu riska ludilo baldaŭ malaperis el la merkato. Pli malbone estas tamen, ke senrespektaj firmoj eligas en la merkaton radioaktivajn substancojn, destinitajn por produkti per sterkado ion, kio nomiĝas atomterpomoj, atomgreno, atompomoj ktp. Terkulturistoj, kulturprovistoj aŭ ĝardenposedantoj devas uzi tiajn sterkojn ne sen antaŭa kontrolo. Se la sterkoj estas forte radioaktivaj ili ne estas libere vendeblaj. Se ili male ne estas radioaktivaj kaj

sekve nedanĝeraj ili estas praktike sensignifaj kaj montras nur la rabinteresojn de la firmoj.

Oni diversmaniere pentris la estonton de la homaro. En terurvizioj oni vidas, kiel pli grandnombre naskiĝos kriplaj kaj paralizitoj; same blindaj kaj surdaj kun diversaj difektoj en la vid- kaj aŭdorganoj; imbecilaj, idiotoj, kretinoj; malsanaj kun kancerotumoroj, kun perturboj en la nutradproceso, kun danĝeraj sangomalsanoj. Ĉio tio akumuliĝos, opinias la pesimistoj, se la homoj ne zorgos pri si en deca tempo, se ili ne komprenas ĝuste protekti sin kontraŭ penetra radiado de eksplodantaj atombomboj aŭ nuboj de radioaktivaj gasoj. Laŭ tiuj pesimistoj la estontaj homoj vivos en malhelaj ŝirmejoj profunde sub la granito, kun la enirejo gardata de la moderna Cerbero, la gardanto ĉe la pordo de morto, la elektralkulilo, kiu ordinare tiktakas senkulpe sed krakadas maŝinpafilo, kiam radioaktiveco estas proksima. Se la homoj supreniras en la taglumon, sur tiun teron, kiu iam nutris arbojn, florojn kaj kantantajn birdojn, ili devas vesti sin per ĝispiedaj plumbomanteloj, kun la kruroj kaj piedoj zorge protektitaj de dikaj botoj kaj kun pezaj kapuloj aŭ gasmaskoj antaŭ la vizaĝoj.

Tio estas feliĉe nur terurvizio — ankoraŭ. Tamen ni devas atenti pri ĉiuj danĝeroj de radioaktiveco kaj neŭtronoj. Ĝis nun militiloj efikis nur vundante kaj mortigante la individuojn. Se la atombombo, kiel okazis en Hiroŝima kaj Nagasaki, laŭ mia opinio por eterna honto al la usonanoj, denove estos uzata por milita servo, ĝiaj eksplodoj neeviteble ŝanĝos kromosomojn kaj heredelementojn en la seksĉeloj de la postvivantoj, se tiuj ne estas protektitaj, kaj detruos tiamaniere la posteulojn, la senkulpajn infanojn, jam antaŭ ilia naskiĝo.

Tio estas ne fantazio. Ni *scias*, ke rentgenradioj, elektronoj, neŭtronoj severe difektas la heredsubstancon, kaj ni *scias* krome, ke la detrua efiko de la neŭtronoj estas multe pli ampleksa ol tiu de la rentgenradioj. Oni kalkulis, ke kontraŭ unu valor-direkta ŝanĝiĝo respondas, je zorgaj provoj, ne malpli ol 700 ŝanĝiĝoj, kiuj difektas aŭ mortigas la organismon. Ripetokaze mi esprimis la penson, ke malbonaj heredelementoj en simpla formo ofte fariĝas signifaj en la evoluo de la individuoj, ke ili kune kun cetero bonaj heredelementoj vivas ilin, por tiel diri,

pelas ilin ĝis la ekstremo de ilia kapablo, devigas ilin transpaŝi la limon, kiu dividas altan talenton de novkreanta genio. Same kiel multaj esploristoj pli frue mi kredis, ke genio iel povas esti kunligita kun frenezo, ofte de hereda naturo. Svedo emas montri al Tegnér, Pröding, Josephson, Hill. Ilia novkrea kapablo vastiĝis, oni opinias, per la ĝermanta malsano. Tiu donis pli vastan movspacon al vizioj kaj revoj. Same kiel la ombro de la morto konturiĝas malantaŭ ĉio, kio vivas, tiel la frenezo estas trovebla en la geniaj linioj kaj la rimarkinda kolorkompono.

Sed la malbonaj heredelementoj, kiuj estiĝas kiam la kromosomoj estas krevigataj de eksteraj rimedoj, estas de tro kruda karaktero por havi ian valoron en la socia vivo. Per ili la homaro estas difektata de interne. Se ili povos libere akumuliĝi, fariĝos Homo sapiens la karikaturo de la saĝo homo, simila al la fabela arbarregantino: elkavigita korpo troviĝas malantaŭ la loga surfaco.

La profunda timo pri la estonto estas do almenaŭ multparte motivita. La fizikisto trovis ŝlosilon al la plej internaj sekretoj de la naturo. Koncernas nin ĉiujn lerni ĝuste uzi ĝin, sen okulŝirmiloj vidi la danĝerojn kaj agi laŭ tio.

Mi volas fini tiun ĉi resumon akcentante ke en la manoj de lertaj plant- kaj bestplibonigantoj rentgenradiado kaj atomkreviĝo certe fariĝos valoraj rimedoj. La rezultoj de dek jaroj ĉe la granda Svalöf-institucio supozigas, ke pasos nemultaj jaroj antaŭ ol aperos en la merkato rentgenaj semspecoj, profite al la terkulturo kaj la nutrado de la lando. Tiel certe okazos pri pizoj per doktoro Gelin en Landskrona, pri dolĉlupeno per docento Tedin en Svalöf, pri hordeo per agronomo Törnquist en Lulå. Sveda esploro gvidas en tio. Herman Nilsson-Ehle, konstruanto de granda formato, frue komprenis la gravecon de tiuj provoj kaj ĉiamaniere subtenis ilin. Bedaŭrinde ni ne vidas eblecon fari tiajn esplorojn pri la homoj, ni ne povas eksperimenti pri ni mem kiel pri dolĉlupenoj aŭ pizoj. Tiu laboro, kiu nun okazas kaj celas anticipi determini kaj antaŭvidi la naturon kaj ecojn de la heredaj ŝanĝiĝoj, tamen eble povos doni al ni vidpunktojn ankaŭ pri la plibonigo de la homo.

Mi komencis tiun ĉi prelegon skizante la belan mondbildon de Pythagoras, ĝian rapidan detruigon; akcentis la kruelan

nuntempan koncepton de la biologio, kiu rifuzas akcepti la penson pri dia plano en la evoluo, eĉ liun pri enhoma alcela strebado, kaj fine pentris per terurvizioj la estonton de la homaro. Iu eble demandas min: "Kion vi mem kredas?" Ambaŭmane mi gestas forige. Sed eble malgraŭ ĉio — kiam ankoraŭ restas la ardo por la vero, la volo kuraĝe renkonti la sorton, ĝi donu bonon aŭ malbonon, tiam mi ankoraŭ fidus la eblecojn de la homo por pliperfektigi sin. Kaj tiu sento por beleco, kiu iam naskiĝis, kiam grotuloj pentris bestojn, militistojn kaj armilojn per riĉaj, ne superitaj koloroj, ŝajnas al mi treege enigma kaj malfacile klarigebla. Teraĵ vortoj estas tiel palaj — sed kune kun la ardo por la vero kaj la sento por beleco eble malgraŭ ĉio naskiĝis dio en la homo.

La svedan manuskripton tradukis S. Engholm.

## Goethe

De JOSEF SOMMER

Antaŭ 200 jaroj, la 28an de aŭgusto 1749, en Frankfurt (Main) estas naskita *Johann Wolfgang Goethe*. Tiun jubileon la germana popolo dece festis; ne per bruaĵ, ceremoniaj solejoj kaj festenoj aŭ aliaj eksteraj pompaj aranĝoj, sed precipe per pli intima rememoro kaj rekupiĝo pri la vivo kaj la verkoj de sia plej granda filo.

Ne unuanima estas la ŝato al tiu poeto. Inter la memori-gantoj ne mankas voĉoj, kiuj diras: "Goethe jam nenion havas por diri al ni; lia mondo jam ne estas nia mondo. Ni havas aliajn zorgojn, aliajn taskojn kaj problemojn; ne plu indas okupi nin pri li." Ĉu ili pravas?

Estas vero: ni jam ne povas vivi, pensi, taksii, ŝati kiel Goethe. Sed ni jam ankaŭ ne povas konstrui kiel la antikvaj grekoj aŭ Erwin von Steinbach, jam ne formi kiel Michelangelo, jam ne pentri kiel Rembrandt aŭ muzikverki kiel J. S. Bach. Tamen ni bezonas ilin, ja en iliaj verkoj revelaciĝas tia subluma vivosento, tia konformeco al la "mondspirito", tia perfekta esprimo de absoluta belo, kiaj estas rifuzitaj al ni

hodiaŭaj homoj. Goethe estis la lasta, kiu vivante jam en tempo de dissolviĝo ankoraŭ unu fojon havis tiun superan vivosenton kaj la suverenan povon por ĝin kapti kaj formi.

Li mem ne tre alte taksis siajn poeziaĵojn. Li eĉ eraris pensante ke ne ili, sed liaj *sciencaj* verkoj konservos lian nomon al la posteularo. "Miaj aĵoj ne povas populariĝi; kiu pensas pri tio kaj al tio strebas, tiu eraras. Ili ne estas skribitaj por la amaso, sed por apartaj homoj, kiuj volas kaj serĉas ion similan kaj estas irantaj en similajn direktojn." Tamen la rondo de tiuj "apartaj" homoj estas ankoraŭ mirige granda. Eble pro tio, ke li inklinis sin okupi pri la daŭra, ne pri la epizoda, pri la necese kaj laŭ eternaj leĝoj ripetiĝanta, ne pri tio, kion la hazarda trafo unufoje estigas.

Multenombraj estas la libroj aperintaj pro la "Goethe-jaro". Ili trovas aĉetantojn malgraŭ la malabundo de mono, la loĝeja mizero inter ruinoj, la senlaboreco. La teatroj prezentas tiun aŭ alian dramon de la poeto, kaj kvankam ili entute neniel prosperas kaj tiuj teatraĵoj ne taŭgas por allogi distriĝemulojn, la nombro de Goethe-amantoj estas sufiĉe granda por eĉ ekonomie pravigi tiujn prezentadojn.

La supre dirita demando, ĉu Goethe havas ankoraŭ signifon por la homoj, praktike do estas jese decidita de la granda plimulto; de tiuj precipe, kiuj meze de antagonismaj ideologioj de nia senpaca, timigata mondo posedas sufiĉe da cmo kaj komprenkapablo aŭ eĉ la bezonon por savi sin kelktempe en la altan, puran, kvietigan sferon de la humanisma, noblespirita mondo de la granda klasikulo "serĉante per la kor" la grekan landon".

La verkaro postlasita de Goethe estas giganta. La eldono plej kompleta, instigita de la granddukino Sophia de Sachsen-Weimar, ampleksas 55 volumojn da poeziaĵoj, 13 vol. da natursciencaj verkoj, 15 vol. da taglibroj, 50 vol. da leteroj. Homo spirite impresiĝema trovas en lia verkaro kaj en aliaj atestaĵoj rilataj al lia vivo kaj kreado kosman kompleksan, kiam apenaŭ alia homa spirito kapablis formi kaj prezenti. Dum sia longa vivo Goethe ja ensorbis la impreson de ĉiaj gravaj eventoj, la temporilatajn fluojn kaj tendencojn, la tutmondan spiritan evoluon de sia epoko, penetrigis ilin en menson kaj animon kaj

artisme rekreante donis al ili eterne validajn pocziajn esprimon kaj formon.

Iuj riproĉis al li, ke do liaj verkoj grandparte nur reproduktas impresojn akiritajn de ekstere. Poeto kreu el si mem! ili postulas; li nepre estu originala! Al tiuj kritikantoj Goethe respondas: "Oni parolas pri originaleco, sed kion tio signifas? De kiam ni estas naskitaj, la mondo komencas efiki sur nin kaj tio daŭras tiel ĝisfine. Kaj ĉie, kion alian ni rajtas nomi nian propran krom energio, forto, volo! Se mi scius diri, kiom mi ŝuldas al eminentaj antaŭuloj kaj kunvivantoj, ne multe restus." — "Vere ja estas malsaĝa demando, ĉu iu havas ion el si mem, aŭ ĉu li ĝin havas de aliaj, ĉu iu efikas per si aŭ per aliaj. Esenca estas tio, ke oni havu grandan voladon kaj posedu lerton kaj persiston por plenumi ĝin." Kaj eĉ: "Estas konscia vantemo, se oni ne volas sincere konfesi sin plagiatisto."

Por fari ion eksterordinaran oni devas esti eksterordinara homo. Goethe estis tia. La naturo estis dotinta ne nur lian menson per inteligento, prudento, artisma kreforto, sed ankaŭ lian korpon per beleco kaj forta vitaleco. Kvankam ne libera de malfortaĵoj li tamen, kompare kun la homo de nia epoko, vivis en stato de interna sano preskaŭ nekomprenbla. Spiritaj kaj fizikaj cooj kune efikis formante altkvalitan, harmonian homon, ekzemplan pri la diro de Juvenalis: mens sana in corpore sano.

Tamen ankaŭ tia personeco ne povas esti io aprioro perfekta, finpreta, sed estiĝanta, disvolviĝanta, maturiĝanta, per studoj, penoj, konfliktoj, spertoj, suferoj kaj — craroj. "Ĉar mi estas homo kaj kiel tia havas homajn malfortaĵojn kaj mankojn, ja ankaŭ miaj skriboj ne povas esti liberaj de ili. Sed ĉar mi prenis serioze mian klerigadon kaj senĉese laboris super mia plinobliĝo, mi estis konstante progresanta kaj ofte okazis, ke kontraŭuloj mallaŭdis min pro iu manko, de kiu mi antaŭ longe liberigis min."

La okdektri jaroj da pasio kaj senlaca aktiveco, dum kiuj ĉiaspecaj kontraŭaĵoj, psika premateco, amara rezignemo alternis kun peniga sed rekuraĝiga subigo de ill, formis, rafinis, hardis kaj saĝigis la personecon de la poeto kaj liaj verkoj estas kvazaŭ sedimento de tiu vivofluo, frakciaĵoj de granda

konfesado. "Ĉiuj miaj poemoj estas okazaj poemoj, ili estas impulsitaj de la realeco kaj sin bazas sur la realo." — "Mi neniam afektis en mia poezio. Kion mi ne vivis, kio ne forte agitis mian spiriton kaj ne premis min, tion mi ankaŭ ne poeziigis kaj ne eldiris. Ampoemojn mi faris, nur kiam mi amis."

Tiel ankaŭ liaj amrilatoj al vico da virinoj naskigis ciklon da "liedoj" apartenantaj al la plej belaj lirikaĵoj, kiujn lia muzo al ni donacis. Ili kompletigas la bildon de tiu vivo de poeto kiel parto de liberiga konfeso, feliĉiga eĉ por ni posteuloj. Lia rilatado al la virinoj nenie estas iel frivola: "Mia ideo pri la virinoj ne estas abstraktita de la realaj aperaĵoj, sed ĝi estas naskita kune kun mi aŭ en mi estiĝis, Dio scias kiel. La virinkarakteroj verke prezentitaj de mi tial ĉiuj estas favore desegnitaj, ili ĉiuj estas pli bonaj ol ili estas renkonteblaj en realeco." Lia alta koncepto pri virina indeco sin manifestas ankaŭ en jena citaĵo el Wilhelm Meisters Lehrjahre: "Ne, vi ne povas senti tion, neniu viro kapablas senti la valoron de virino, kiu scias sin teni honorinda! Per ĉiuj sanktaj anĝeloj, per ĉiuj bildoj de beateco, kiujn pura koro kreas al si: estas nenio pli ĉieleca ol virino donanta sin al la viro amata."

La *mondbildo* prezentita en la verkoj de Goethe estas simbolo de lia propra interno. La abundon de la mondfenomenoj, de la esto, li povas esplori kaj prezenti nur per la rigardanta, meditanta, amanta memo kaj tial ankaŭ la propra mio sin prezentas en la verkaro. Li do evoluigis la aŭtobiografion ĝis alteco antaŭe ne atingita kaj kreis lirikan poezion, kiu levas la vivitan momenton en sferon de eterneco. Li krcis poemaron de intima interneco kaj psikologia verceo, kiun li mem nomas konfesoj. "Se oni volas lasi al la posteularo ion taŭgan, tio devas esti konfesoj, oni sin prezentu kiel individuon, kiel oni pensas, kiel oni opinias, kaj la sekvontoj elserĉu, kio al ili konvenas kaj kio ĝenerale eble validas."

La verkoj de Goethe sin bazas sur lia ideo: la mondo al ni reala estas nur "Abglanz" (profundsenca, metafora nocio de Goethe kreita), "rebrilo" de la neperceptebla, senlima, absoluta, esence kosma. La homa spirito, nekapabla ekkoni senpere la diecan, tamen ne palpas en plena obskuro ekkonante la dian en ĝia rebrilo: "La vera, identa kun la dia, neniam lasas



sin rekte ekkoni de ni. Ni vidas ĝin nur kiel rebrilon, ekzemplon, simbolon en apartaj kaj parencaj fenomenoj; ni perceptas ĝin kiel nekompreneblan vivon kaj ne povas rezigni la deziron tamen kompreni ĝin. Tio validas pri ĉiuj fenomenoj de la perceptebla mondo."

La fenomenojn de la *naturu*, kiuj ne plu estas redukteblaj, sed konjektigas pri io finfina, post ili estanta, Goethe nomas "prafenomenoj". La sentema homo ilin rigardanta estas edife tuŝata, anime vibrigata. "La naturo kaŝas Dion. Sed ne al ĉiu." Dependas de la homo, ĉu li disponas la anten-organon por tion senti kaj kapti. "Ĉu ne en fulmo, tondro kaj ŝtormo ni devas senti la proksimecon de superforta potenco, en florodoro kaj dolĉe varmeta ventsusuro amoplene proksimiĝantan estaĵon?"

En la poemoj de la matura Goethe la mio pli kaj pli intime sin enritmigas en la diastolon-sistolon de la naturo. De ĝi eliras puriga, saniga cfiko; al ĉi tiu sin donante la homo fariĝas tia, kia Dio lin volas. "Fortoj, kiuj faras nin produktivaj, estas en ripozo kaj en dormo, sed ili estas ankaŭ en sinmovado. Tiaj fortoj estas en la akvo kaj precipe en la atmosfero. La froŝa aero de libera kamparo estas la taŭga loko, kie ni devas restadi; estas kvazaŭ tie la spirito de Dio senpere b'ovus al ni kaj dia forto al ni influus."

La naturliriko de la maljuna Goethe multfoje montras al la dia en la naturo, revelaciaĵo de *ordo* kaj *bele*. Morale indifereanta, la naturo tamen donas al ni la ideon pri la morala leĝo: "Ankaŭ interne estas universo". La homo estus nura animalo, se li ne kapablus pensi la moralan leĝon kaj per tio ne havus rilaton al la absoluta. Kion justan li volas kaj faras, tio estas analogikonkludo el la dia mondordo; kaj tiel ankaŭ la morala konscienco, la "leĝo en mi" (Kant) estas prafenomeno signanta rekte la mondracion.

Naturkoncepto, akirita el rigardado al la naturo, do iĝas al Goethe mondkoncepto. La naturo estas aperformo de Dio kaj el tio Goethe ĉerpas la konsolan fidon: "Neniu estaĵo povas disfali en nenion! Plumoviĝadas en ĉio la eterna. Al la estado tenu vin feliĉigite! La estado estas eterna!" Kaj eterna estas ankaŭ la homa spirito, kiu ĉiam strebante penadas, atendante

la revenon en novan ekziston: "Mi sentas min preta / per nova vojo penetri tra la etero / al novaj sferoj de pura aktiveco."

Ideo naskas *faron*. "Genio estas nenio alia ol tiu produktiva forto, per kiu estiĝas faroj, kiuj prave povas sin montri antaŭ Dio kaj la naturo, do havas sekvon kaj estas daŭremaj." La kredo de Goethe je la daŭrekzisto de la animo, je la reenkar-niĝo, sekvas precipe el lia koncepto pri la agado, la aktiveco: "La konvinko pri nia daŭrado fontas al mi el la ideo pri la aktiveco; ĉar se mi senriproze laboradas ĝis mia fino, la naturo ŝuldas asigni al mi alian formon de ekzisto, kiam la nuna ne plu kapablas servi al mia spirito."

Goethe do konscie sin sentas faradanto. "Skribite estas: En la komenco estis la vorto", diras Faŭst. Tamen tiel alta li ne scias taksu la vorton, nek la sencon, eĉ ne la forton, kaj fine li skribas plenfide: "En la komenco estis la *faro!*" La postulon: Konu vin mem! Goethe respondas: "Kiel oni povas koni sin mem? Per konsiderado neniam sed per agado. Provu fari vian devon, kaj vi scios tuj, kia vi estas. — Sed kio estas via devo? La postulo de la tago." Al lia mondbildo apartenas ĉiame aganta mondsprito; per sia aktiveco la homo sin ensvingas en la ritmon de la mondo.

Al la ciklo de prafenomenoj de la vivo apartenas fine la *amo*. La verkaro de Goethe estas unika laŭ la multvarieco de la amo, ampleksanta la tutan skalon de serena voluptoĝuo ĝis kvietita spiritaliĝo kaj maldolĉa rezignacio. Sed ĉiam en tio regas la simbolismo, ke la interhoma, surtera amo estas ekzempla analogio de ĉiela amo kaj ke la dia aperas kiel io amanta. "Estas la potenca amo, kiu ĉion kreas, ĉion prosperigas." Ĉiam la mio sopiras ion transliman, altiĝon super la mi-eco, kaj estas ĝuste la amo, kiu simbole konigas, ke plej alta homfeliĉo estas "sin trovi en la senlima".

Goethe ne apartenis al tiuj neraraj nurpoetoj, kiuj emas sin apartigi de la mondo kaj sin enteksi en sian poetan medion, inklinas vivi retiriĝe kaj solece kaj do verkas el la regiono de siaj revoj, sopiroj kaj fantazio. Li staris meze de la vivo, forte okupita kiel oficisto kaj sciencisto. Sian postenon kiel ministro li malgraŭ la intima amikeco al la grandduko Ernst

Aŭgust tute ne rigardis kiel sinekuron; male, tiu ofico absorbis multege da laborforto, tempo kaj peno same kiel liaj devoj de kortegano, teatra intendanto kaj reĝisoro. Krome li estis fervora desegnisto, ĝardenkulturanto, kolekto de kvazaŭa muzeo de gravuraĵoj kaj aliaj artobjektoj, de mineraloj, esploro pri geologio, kromatiko, botaniko, anatomio k. a. Li estis mondulo kaj grandsinjoro, impona per la natura indo de eminenta, signifa personco.

Vere la moderna scienco de longe jam ne tie haltas, kie la scienco de Goethe renkontis limon. Kelkaj el la rezultoj de lia esploro montriĝis ĉe eraraĵoj. Sed lia sinteza rigardado laŭ la tuteco de la fenomenoj kiel croj de nedividebla vivokomplekso estas same nearkaika kiel lia artisma mondbildo. Li do ne vidis la objektojn aparte kaj dise, li metis ilin en la grandan kosman koheron observante iliajn reciprokajn rilatojn. Ĉiam li konsideris unue la ĝeneralan kaj de tie transiris al la aparta, era. Se poste la scienco iris laŭ la direkto inversa, ĝi verdire atingis gravajn rezultojn, sed ĝi perdis la kunigan superriĝardon pri la tuteco de la fenomenoj, la homaro malriĉiĝis je tiu spirito de universala konceptado, ĝi pli kaj pli tendencas droni en materialismo. Kaj ĝi vere ne fariĝis pli feliĉa nek pli libera.

Multaj pensas ke al la filo de frankfurta patricio kaj posta ministro, kiun la virinoj adoris kaj kiun respektis kaj gloris tuta Eŭropo, estis facile formi sian "senzorgan" vivon artaĵo. Sed ĉu iu homa sorto estas sentata pli aŭ malpli peza tio dependas ne de la nombro kaj speco de la batoj ricevita sed de la individua kapablo suferi. Goethe devis subigi en sia brusto pli da konfliktoj ol alia, ordinara homo. Lia socie alta pozicio ne protektis lin kontraŭ la komune homaj suferoj. Ke li abunde ilin travivis, pri tio atestas pli ol liaj aliaj verkoj la Faŭstodramo. "Estas tutogale ĉu oni estas socie altranga aŭ simpla, ĉiu tamen estas devigata suferi kiel homo." — "Oni flatis min kiel aparte favoratan de la feliĉo; ankaŭ mi ne volas plendi nek riproĉi la iron de mia vivo. Tamen enfunde ĝi estis nur peno kaj laboro kaj mi rajtas diri, ke en miaj sepdek kvin jaroj mi havis ne kvar semajnojn da efektiva sento de agrableco. Estis la eterna rulado de ŝtono, kiu estis ĉiam

ree levenda ... Estis tro multe da pretendoj je mia agado, kaj de ekstere kaj de interne. Mia vera feliĉo estis miaj poeziaj pensado kaj kreado."

Al la skizita bildo mankus trajto interesa precipe por ni esperantistoj, se fine ne estus dirataj kelkaj vortoj pri la *kosmopolito* Goethe. Ŝatante ordon kaj aŭtoritatecon li tamen estis malproksima de ĉia naciismo. Li vidis la mankojn kaj malfortaĵojn ne nur de fremdaj popoloj sed unue kaj pli klare tiujn de siaj samlandanoj, kaj li montris ilin senindulge. Kiel filozofanta poeto li atentis observis la eventojn kaj fenomenojn tutmondajn kaj partoprenis la universalan spiritan vivon legante ĉion signifan, kion la literaturo de la tiama kultura mondo prezentis. Al ĉio ĉi li celis kritike akiri propran decidan rilaton. Sed lia kritika juĝo ĉiam estis influita de bonvolo kaj justeco. En liaj lastaj vivjaroj ofte okupis lin la ideo de kreinda mondliteraturo, per kiu li komprenis unuiĝon de la diversaj literaturoj ĉiupopolaj rilate al iliaj principoj. Liaj propraj verkoj elspiras tiun universalan spiriton. "Lia elradiado" diras André Gide, "atingis malproksimen trans la limoj de la grandduklando Weimar, trans tuta Germanujo: tutan Eŭropon li regis per sia spirito kaj tiel plivastigis sian patrujon."

## Vitus Bering

de POUL THORSEN

"Komandkapitano *Vitus Bering* mortis la 8-an de decembro (1741). Lia kadavro estis ligata al tabulo kaj enterigata. Ĉiuj aliaj mortintoj estis entombigataj sen tabulo. Mi devas paroli pri la mizera stato de la komandkapitano, kiam proksimiĝis la fino. Plenprave mi diras, ke duono de lia korpo troviĝis en la tombo, jam kiam li vivis. Eĉ se estus eble lin teni libera de la tero, tio estis kontraŭ lia volo. Li diris: 'Ju pli profunde mi ripozas en la tero, des pli varme estas al mi. La korpoparto supertera suferas pro la malvarmo.' — Estis ja tiel, ke li kuŝis en sabla kaveto, kaj el ĉiuj flankoj la sablo fluis mal-

supren, plenigante la kavon, kaj ĉar li kuŝis en la mezo de la truo, duona parto de la korpo jam troviĝis sub la sablo.”

(Raporto de Sv. Waxell, vickomandanto de Bering.)

Tiel mortis mizere la dana esploristo Vitus Bering sur la dezerta insulo, kiu portas lian nomon. Kiel li venis tien?

Tute juna Bering fariĝis maristo, venis al Nederlando kaj tie simile al multaj aliaj el okcidento estis varbata de la rusa caro Petro la Granda por servi en rusaj militŝipoj. Rapide li trapasis la gradojn ĝis kapitano.

La caro estis treege energia homo. Inter alie li estis tre fervora por definitive konstati la vastecon de sia granda regno, precipe en orienta direkto. La marbordoj norde de Siberio estis tiam ankoraŭ ne trafikataj. Ankaŭ la okcidenta marbordo de Ameriko ne estis esplorita — almenaŭ ne norde de Kalifornio. Plej oriente en la rusa regno troviĝis kelkaj disaj postenoj sur la duoninsulo Kamĉatko, sed neniu konis la faktan limigon eĉ de tiu provinco. Eble ĝi sude estis ligita al norda Japanujo? Sagaculoj kolportis onidirojn ankaŭ pri iu fantomlando *Gama*, kiu laŭ kelkaj markatoj tute certe troviĝis en la norda parto de Pacifiko.

Komisiite de la caro entreprenis Bering du grandskalajn, preskaŭ nekredible penigajn ekspediciojn por solvi tiujn problemojn. Unu ekspedicio ne sufiĉis, ĉar la plisaĝuloj hejme en siaj ĉambroj ne volis agnoski liajn pruvojn kaj observojn, verdire ankaŭ nemultajn, ke Azio ne estas rekte ligita al Ameriko, sed ke disigas la du mondpartojn larĝa markolo, — tiu, kiu nun portas la nomon de Bering.

La unua ekspedicio daŭris kvin jarojn, la dua pli ol dek, kaj en tiu lasta partoprenis pli ol 2000 personoj.

La plej grandan parton de la provizoj, eĉ ankroj, kanonoj, ŝnuregoj, najloj, gudro, veloj ktp oni devis transporti surtere la tutan vojon de St. Peterburgo al Oĥotska maro — pli ol 7000 km laŭ rekta linio. La transporto okazis per ĉaroj tra senvojaj stepoj kaj senfinaj arbaroj. Por transiri riverojn estis multloke necese meti la tutan ŝarĝon en pramojn, kiujn oni ĉiam surloke ĉarpentis. Sed la riveregoj ankaŭ faciligis. Estis eble ŝipveturi sur ili norden kaj orienten milojn da kilometroj. Oni

komprenas, ke nur post trijara vojaĝo oni sukcesis atingi la lokon por la efektiva ekspedicio.

La dano Martin Spangberg estis pioniro kaj provizisto dum la tuta irado tra Siberio. Kun ordonoj de la registaro kaj kelkmonata antaŭeco li markis la vojon, mobilizis la lokajn oficistojn, zorgis pri loĝado ktp. En Jakutsk estis necese establi tute novan fandejon, kaj en la vilaĝo Oĥotsk oni starigis ŝipkonstruejon.

La unua Beringekspedicio ŝipveturis de Oĥotsk al Kamĉatko, daŭrigis piede aŭ per hundsledo — ne malpli ol 5000 hundojn oni havigis — konstruis novajn ŝipojn ĉe Pacifiko kaj fine esploris la markolon inter Azio kaj Ameriko. Tiun ĉi fojon oni por la dua, pli granda ekspedicio tuj konstruis en Oĥotsk kvin ŝipojn, kiuj ĉirkaŭiris Kamĉatkon kaj sur ĝia orienta bordo fondis novan urbon kun haveno: Petropavlovsk.

Marŝante tra Siberio Bering ĉiujare sendis ŝipojn laŭ la nordaj riveregoj por esplori la bordojn de Glacia Maro. Kelkaj klopodis ĉirkaŭpaŝi Azion — la t. n. nordorienta pasejo — por aliĝi en Kamĉatko al la ĉefekspedicio.

Unu tian ŝipon kondukis juna dano, Petro Lassenius, kiu mizere pereis kun kvindek da bravuloj en la delto de la rivero Lena, pro malsato kaj skorbuto. — Aliaj pli bone sukcesis, sed nur unu ŝipo sukcesis persiste daŭrigi nordorienten de la kontinento. Tie, norde de la markolo de Bering, ĝi fiksiĝis en la glaciamasoj, kaj nur venontjare ĝi povis iri returne al Jakutsk, la elirbazo.

Kapitano Spangberg kiel unua havis sian ŝipon preta en Oĥotsk. Baldaŭ li veliris suden kaj rapide trovis Japanujon. Tiel oni konstatis, ke tiu lando estas aparta insularo. La ŝipanoj havis viglan kontakton kun multaj japanaj ŝipetoj. Ne estis dubo, ke vere estas japanoj. Sed por nenion riski oni ne surbordiĝis sed reiris por raportoj.

Dume Ecring mem direktis sin al Ameriko kun du ŝipoj, kiuj tamen plene izoliĝis unu de la alia en la ventega kaj nebula vetero. Unu reiris post danĝeraj travivaĵoj, sed tiu de Bering persistis. La lokon, kie devus troviĝi la fantazilando Gama, oni trapasis plurdirekte, sed oni vidis nur ĉielon kaj maron.

Unu neforgeseblan tagon aperis ĉe la horizonto la altegaj neĝokovritaj montoj de Alasko. Oni baptis la lokon *Kabo Elias*.

Poste oni daŭrigis norden, ofte esplorante la bordojn. Tio estis ne sendanĝera afero, ĉar plurfoje okazis interpuŝoj kun la indiĝenoj, kio kaŭzis gravajn perdojn de ŝipanoj kaj boatoj.

La vetero estis la plej malbona, kiun oni povas imagi. Post kvarmonata krozado preskaŭ la tuta ŝipanaro, inkluzive la komandanton, suferis pro fortega skorbuto, ankaŭ pro sentebla manko de freŝa akvo. Montriĝis preskaŭ necble per la malmultaj sanaj maristoj manovri tra la furiozaj aŭtunaj uraganoj, kaj kiam oni atingis konsiderinde grandan insulon, la 4-an de novembro 1741, oni decidis (cetere kontraŭ la voĉo de la mortmalsana Bering) surbordiĝi por flegi la malsanulojn kaj eventuale travintri.

Sed por la plimulto de la malfeliĉuloj la decido signifis katastrofon. La malsanuloj mortis arc jam sur la ferdeko pro la malmilda acro aŭ pro la penegoj por atingi la bordon.

Kiam la anaro estis forlasinta la ŝipon, ĝi tuj rompiĝis. Restis nur la ĉblo ekloĝi en terkavoj kun veltukoj kiel tegmento. Arboj ne troviĝis sur la insulo. Do ne troviĝis ligno por konstrui domon kaj apenaŭ por bruligi fajron.

Iom da faruno kaj aliaj provizoj estis savitaj sed tute ne sufiĉe por la longa vintro. Feliĉe la faŭno estis relative riĉa sur kaj ĉirkaŭ la insulo. Komence oni ĉefe vivtenis sin per marlutroj, kies viando tamen estis tendena, malmolega kaj naŭza. Dum kelka tempo la lardamaso de surgrundiĝinta baleno servis kiel provizejo — flarebla je longa distanco.

Komence la viroj dum ĉasado povis tute proksimiĝi al la bestoj por mortbati ilin per stangoj. Poste fariĝis pli kaj pli malfacile. T. n. marursoj estis kelkfoje kaptataj, sed ili gustis same vomige kiel lutroj. Fokoj troviĝis kaj same marleonoj, sed plej frande bongustaj estis la t. n. marbovinoj aŭ ŝelbestoj, bestspeco nun tute ekstermita. Tiuj estis kolosaj mamuloj pezantaj ĝis 4000 kg. Unu ekzemplero sufiĉis por satigi la tutan ŝipanaron dum kelkaj semajnoj. Sed la kaptado estis tre malfacila. La "bovinoj" paŝtis sin en la fukaj kreskaĵoj apud la bordo kaj estis necese harpuni ilin el boato. Unu ekstremo de la harpunŝnuro troviĝis sur la bordo, kaj tuj post la har-

punĵeto oni lasis la ŝnuron. Ĉiuj ŝipanoj sur la bordo (proks. 40) devis tiri la beston sur la teron. Sed la marbovinoj estis troege fortikaj kaj viglaj. Ofte finiĝis la lukto de la viroj per ilia malvenko en la malvarma akvo.

La vintro estis longa kaj severa. Neĝo kaj frosto postulis siajn viktimojn, same la skorbuto. Sole dum novembro kaj decembro, la du unuaj monatoj sur la insulo, mortis 30 el la originaj 77 homoj. La mortintoj ofte kuŝis longtempe inter la vivantoj, tiel ke apenaŭ estis eble distingi tiujn lastajn de la unuaj. Nur la plej rezistaj kapablis ĉiutage havigi manĝaĵon aŭ kolekti drivlignon por iom da kuirado kaj varmigo.

La skorbuto ĉesis, nur kiam la printempo finfine venis, kaj la vintra malkontento kaj kverelema malaperis, kiam oni decidis labori laŭ fiksita plano por povi eskapi de la insulo.

Laŭ la plano parto de la viroj devis tute okupi sin pri konstruado de nova ŝipo el la rompitaĵ restajoj de la malnova. La aliaj devis kolckti provizojn kaj lignon, ege malfacila tasko, ĉar sen ŝuoj kaj dum sufero ili devis marŝi en monta tereno ĝis 30 km ĉiutage. Ĉion oni devis porti surdorse, kaj la ĉasbestoj konstante fariĝis pli kaj pli malfacile kaptetblaj.

Neniu ĉarpentisto travivis la vintron, sekve la ŝipkonstruado malrapide progresis. Plej bonkvalifika estis helplaboristo el la ŝipkonstruejo en Oĥotsk. Sed li montris sin tre energia kaj eltrovema kaj ekzemple havigis multbezontan gudron per bolado de malnovaj ŝnurrestajoj.

Nur en aŭgusto — post naŭmonata restado sur la insulo — oni estis preta glitigi la novan ŝipon en la akvon. Tiam vivis ankoraŭ 36 personoj. Post tritaga kalfatrado kaj provizado oni kuraĝe veliris en direkto al Kamĉatko. Malgraŭ pluraj akcidentoj la restajoj de la ekspedicio post dekkvartaga veturado reatingis per sia truplema ŝipeto la havenon de Petropavlovsk.

Malgraŭ sia frua morto Bering do sukcesis montri la vojon. Hodiaŭ la nordorienta pasejo havas grandegan trafikon kaj ekonomian signifon. Ĉiusomere dekoj de ŝipoj iras laŭ la siberiaj riveregoj kaj orienten al Pacifiko, kie prosperas du urboj fonditaj de Bering: Oĥotsk kaj Petropavlovsk.

Bering neniam post sia junaĝa forkuro revidis sian patro-

landon. Iomete amare li skribas iam, ke nek lia "kara onklino en la urbo Horsens, nek aliaj parencoj trovis tempon skribi al la forkurinta maristo en St. Peterburgo". Tamen li testamentis sian patran heredaĵon al infanoj de malriĉuloj en Horsens, lia naskurbo.

En 1941, la ducenta jaro post la morto de Bering, estis eldonata dana poŝtmarko kun lia portreto kaj motivo de lia luktaĵo kontraŭ la elementoj. — Longtempe staris nur simpla ligna kruco sur lia ventmordita tombo, sed en 1802 oni starigis tie pli indan monumenton. Ankaŭ en Petropavlovsk troviĝas monumento al Bering. Sed en Danujo ankoraŭ mankas tia, eĉ en lia urbo Horsens. Verdire oni antaŭ pli ol ok jaroj planis kaj desegnis memormuron el kaheloj, kiu prezentu ondegon, kiu frakas la facilrompeblan ŝipon de Bering. Antaŭ la muro staru



*Vitus Bering, la retrovita sola aŭtentika portreto.*

kelkaj malnovaj originalaj kanonoj trovitaj sur la Bering-insulo. Sovetaj institucioj promesis sendi ilin, sed la milito ŝajne haltigis la transportadon, tiel ke la kanonoj atingis nur Moskvon.

Interese estas, ke en 1948 surprize alvenis al la urbestro de Horsens sendaĵo el Sovetio — de Popola Komisarejo de Militŝiparo. La pakajo enhavis donace reproduktaĵon de la sola origina portreto de Vitus Bering. Hazarde la Komisariejo eltrovis la pentraĵon en Moskvo 1915. Ĝin posedis nepino de Bering, kaj ĝi estis rimarkinde bone konservita, kvankam ĝi estis pentrita sur ordinara, solida pakpapero, eĉ plurfoje faldita. La artisto estas nekonata, sed certe estis partoprenanto de unu el la grandiozaj Bering-ekspedicioj.

## Tradukado

Tradukanto devas perfekte scii la lingvon, en kiun li tradukas, kaj li devas perfekte skribi en ĝi. La tuta ĝenerala vortrezoro devas esti viva en lia menso, kaj li devas funde koni ĉion pri vortoj kaj frazkonstruado. Li devas havi viglan imagon pri vortoj kaj esprimoj, por ke li trovu kaj elektu tion, kio plej bone redonas la originan tekston.

Vortaroj estas necesaj. Sed ili estas laborrimcedoj, kontroliloj kaj sugestiloj. Sole per zorga vortaruzado oni ne povas fari bonan tradukon.

Tradukanto de belliteraturo devas krome havi verkan talenton. Tradukado estas lingva rekreado. Liaj redonaj esprimkapablo kaj lingva fantazio devas egali al la originale kreantaj de la verkinto. Por traduki altnivelan belliteraturon estas krome necesaj vasta kaj funda kompreno por belliteraturo ĝenerale kaj speciala sento por la stilo kaj la enhavo de tradukotaj verkoj.

Tio estas la plej grava en tradukado.

Tradukanto devas kontentige scii ankaŭ la lingvon el kiu li tradukas, sed li ne bezonas scii ĝin same bone kiel sian tra-

duklingvon. Sufiĉas, se li certe scias la signifon de ĉio en la tradukota verko. Se li havas bonan ĝeneralan scion pri la koncerna lingvo, bonaj vortaroj povas helpi en la plej multaj lokoj, kaj por la restantaj necertaĵoj li povas havigi informojn. Tiel estas kreitaj ĉiuj tradukoj en naciaj lingvoj, eĉ la plej perfektaj de la plej gravaj kaj plej altnivelaĵoj verkoj.

Esperantisto ordinare tradukas el sia gepatra lingvo. Tial la tekstaj malfacilaĵoj en tradukota verko estas malmultaj kaj facile venkeblaj. Sed la kondiĉoj por bona tradukado estas same severaj kiel tiuj, kiuj validas por nacilingva tradukanto.

Se la tradukanto havas la menciitajn kvalitojn, estas tamen necesa multe da ekzercado, pri diversaj temoj, en diversaj stiloj. Okazan, negravan tradukon povas fari kiu ajn lingvolerta homo. Por fari tradukon kun literatura pretendo la tradukanto devas esti pli malpli fakulo. En tradukado same kiel en ĉiuj laboroj nur daŭra kaj serioza okupiĝo pri la afero donas la bezonatan lertecon.

Ne malofte neperfektaj esperantistoj, precipe novaj kaj junaj fervoruloj, faras tradukojn kaj aspiras pri aperigo. Ĉu konsili ilin atendi, ĝis ili estos perfektaj? Apenaŭ. Ĉiu evoluas en sia maniero, kaj kiu emas lerni, tiu lernas eĉ de propraj malsaĝaĵoj.

La supre donitaj principoj havas sencon kaj signifon por evoluinta lingvoflegado, por ni ĉiuj, kiuj jam estas pli malpli spertaj kaj lertaj kaj komprenas la gravecon de lingvouzo kiel eble plej bona. Tiuj gvidprincipoj estas kaj restos idcalo, ĉe ni kiel en naciaj lingvoj nur malofte atingebla. Sed ju pli ni atentis pri tiu idealo, des pli ni proksimiĝos al ĝi.

\*

Tradukanto devas plene adapti sin al tiu lingvo en kiun li tradukas, uzi ĝian vortprovizon kaj ĝian sintakson, sekvi la ĝeneralaĵn lingvokutimojn. Tio estas en nacia lingvo afero tiom memkomprenebla, ke oni ĝenerale neniom pensas pri ĝi. Angla traduko el alia lingvo estas el lingva vidpunkto des pli bona, ju pli bona estas la angla lingvo en ĝi.

En esperanto oni povas trovi tradukojn, kiuj donas la impreson, ke la tradukanto adaptis ne sin al esperanto sed esperanton al la lingvo, el kiu li tradukis. Eble ne estas strange, se

liuj esperantaj tradukantoj opinias, ke esperanto povas elaste adapti sin al la koncerna nacia lingvo kaj sekvi ĝin en frazkonstruoj, esprimmanieroj, ritmo ktp, tiel ensorbante kaj plene redonante la spiriton de tiu lingvo. Oni senbride laŭdis la kvalitojn de esperanto kiel traduklingvo, ĝian kapablon ĉiel redoni nacilingvajn originalojn. Iuj tradukantoj povas el tio facile konkludi, ke esperanta traduko el iu nacia lingvo devas esti kvazaŭ transformado de esperanto por la specialaj bezonoj de tiu lingvo.

Esperanto estas memstara lingvo kun propraj kvalitoj. Tradukanto devas antaŭ ĉio respekti esperanton kaj adapti sin al ĝi. Se esprimo aŭ frazo ne estas rekte redonebla en esperanto, la tradukanto nek kripligu nek komplikigu esperanton por fidele imiti la originalon. Esperanta traduko devas el lingva vidpunkto antaŭ ĉio esti esperante bona.

\*

Naciaj skribitaj literaturoj ofte, verŝajne plej ofte, komenciĝas per tradukoj. Sed eĉ la plej perfektaj tradukoj ne estas propra literaturo de tiu lingvo, en kiu ili troviĝas, ne estas esprimo de propra spirita vivo de la popolo, kiu legas ilin. Eĉ mezbona kaj mankohava verko originala havas por la popolo kaj la lingvo tute alispecan kaj multe pli gravan valoron ol tre altnivelaĵoj tradukoj.

*S. Engholm.*

## Atentigo pri Malgranda Revuo

Mi pripensis, ĉu estas eble eldoni MR pli ampleksa aŭ pli ofte. Kun la nuna amplekso kaj eldonto tempo estas malfacile en kontentiga maniero pritrakti novan literaturon. Foje libroj devas tro longe atendi mencion, kaj manko de loko necesigas tro resumajn recenzojn. Tamen la loko dediĉita al recenzoj estas tro granda proporcie al la cetera enhavo. MR ja ne estas esence literatura revuo. Pluc, kvaronjaro estas tro longa tempo inter la numeroj, ŝajnas al mi, kiam temas pri debato kaj

diskutado. Kaj fine, povas esti, ke pro tiu longa intertempo iuj homoj eĉ ne atentis pri la ekzisto de la revuo.

Plioftigi aŭ pligrandigi la revuon kun la sama jarabona prezo kiel nun ne estas eble. La nuna perdo estas tiom granda, ke mi ne povas fordoni pli da mono. La abonnumero efektive iom kreskis (tamen plejparte en landoj, kiuj nun ne povas pagi), sed preskostoj kaj afranko altiĝis pli. La abonnumero kaj la intereso por la revuo tamen estas kreskantaj. Tial mi supozas, ke estos eble aperigi la revuon dumonate, se vi konsentos pagi 6 kr jare por 6 numeroj, kaj se vi, legantoj kaj amikoj de MR, helpos havigi al ĝi minimume 150—200 novajn abonantojn por la venonta jaro. Tiu altiĝo estas nepre necesa, por ke la afero ebligu, ĉar la nuna abonnumero estas nur ĉ. 500.

Rilate al ekonomio kaj laboro estus por mi pli avantaĝe aperigi jare 4 48-paĝajn numerojn por po 1,50 kr. Sed mi kredas, ke tia aranĝo estus malpli celkonvena.

Ne nur novaj abonantoj estas necesaj sed ankaŭ pli da taŭgaj artikoloj. Eĉ por la kvar nunaj numeroj jare estas tre malfacile akiri kontentige da presindaj artikoloj. Sed mi esperas, ke la ĝisnunaj kunlaborantoj fidele restos, kaj ke ankaŭ venos novaj. Same kiel mi aperigis tradukojn de eminentaj svedaj humanistoj, mi volonte akceptos tiajn tradukojn de unuakvalitaj artikoloj el alilandaj revuoj kaj gazetoj (kompreneble kun aperigpermeso kaj informo pri pagopostuloj). Aperigo de tiaj artikoloj estas cetere sentruda sed tre efika propagando por esperanto al tiuj aŭtoroj kaj iliaj rondoj.

Do, se vi ne rekte malkonsilos tion, mi supozos, ke vi pense kaj age subtenos mian planon, kaj mi venontjare provos eldoni 6 numerojn kun la nuna amplekso. Se vi nun pagos 6 kr. en jarabono, sed mi pro tro malgranda abonnumero aŭ manko de manuskriptoj ne povos eldoni 6 numerojn en la jaro, la mono kompreneble tamen validos por 6 numeroj, kaj vi nenion perdos.

Por ne agi sole laŭ mia subjektiva koncepto pri la afero, mi estus tre danka pro kelkaj vortoj de iuj legantoj. Ĉu vi emas subteni mian planon pri dumonata revuo, ĉu kvaronjara pli ampleksa eldono estus kontentiga, aŭ ĉu sufiĉas la nuna MR?

\*

Ĉiuj, kiuj vendis aŭ aĉetis malnovajn numerojn de MR faris al mi valoran servon, kaj mi kore dankas ilin. De ĉiuj nroj de 1947 kaj 1948 restas tamen ankoraŭ meznombro 100 ekz., same de la numeroj 3/44, 4/44, 4/46. Certe iuj el vi povus helpi por malgrandigi tiun nombron kaj tiel plifaciligi daŭrigon kaj plibonigon de nia revuo, vendante al lokaj samideanoj aŭ aĉtante por amikoj. La prezo por ĉiuj tiuj numeroj estas (neta prezo) po 0,50 kr. — duono de la origina. — De la jarkolekto de 1949 restas kelkaj dekoj de ekz., de kiuj mi ankaŭ volonte liberigis. Por ili validas tamen la ordinara prezo.

*Stellan Kngholm.*

## Literaturo

Leteroj de L. L. Zamenhof, volumo I.

La tragedio de lia vivo rivelita de lia ĵus retrovita korespondo kun la francaj eminentuloj. Prezentado kaj komentado de prof. Waringhien. 388 p. form. 14,5×20, tole bind. Prezo 3 dol. Eldonis SAT.

Tiu ĉi volumo, per kiu la verko estas prota, prezentas la kulminon kaj la solvigon de la dramo, kies komenco kaj evoluo ĝis maturiĝo estas donitaj en la unua volumo. Tiu historio en leteroj efektive impresas kiel dramo, spirite reala kaj gravsignifa — kvankam foje nekomprenbla — sed preskaŭ nekredibla kiel bildo el la konkreta, ĉiutaga vivo. Kaj la ĉefrolantoj donas tiun ne plene analizeblan impreson de homoj sortoligitaj kaj sorton kreantaj, kiujn ni trovas en la grandaj klasikaj verkoj. Sed pri la dramo kaj ĝiaj detaloj mi ne skribos. Logu mem!

Krom la prezentado de tio, kio okazis, la leteroj donas gravan kompletigon al la bildo de Zamenhof, ĉiukaze ŝajnas tiel al mi.

Zamenhof estis profeto kaj ne inter la malgrandaj. Sed li malhavis ĉiujn superfluaĵajn malnovtempajn cojn de profeto kaj posedis nur la esencon; tial ni ankoraŭ nur tre malklare perceptas kaj konceptas lian efektivan spiritan grandecon. Li

estis tiom granda, ke majstroadorado povas signifi nur malrespekton aŭ nekomprenon. Sed kiel aliaj profetoj li foje havis, aŭ ĉiukaze ŝajnis havi, tro optimisman koncepton pri la homoj. Oni do povus supozi, ke li estus nebona diplomato. Tamen mi ne povas imagi pli perfektan diplomation ol tiun, kiu montriĝas en liaj leteroj al la rolantoj en la idokonflikto kaj en lia sinteno al ili. Nomi tion diplomatio tamen estus ofendo al Zamenhof. Tio estis plej perfekta adaptiĝo al la homoj, por la bono de ili mem kaj de ĉiuj. Estis neniu sagaco en tio. Zamenhof estis tia, kaj konduti alie li ne povis. Tiu adaptiĝo al la homoj ne estis plaĉemo. Tion montras lia obstina firmeco, kiam oni tentas lin per kompromisoj efektive danĝeraj. Lia sento por la "realaĵoj" estis multe pli granda, ol oni antaŭe povis supozi.

Per Leteroj de L. L. Zamenhof profesoro Waringhien pretigis verkon, kiu jam de la apero estas inter la plej gravaj klasikaĵoj de la esperanta literaturo. Ĝia enhavo jam apartenas al historio. Sed historio estas akumulita spirita energio, akumulita aspirado kaj klopodado. Le esenco de la pasintaj aferoj vivas en ni kaj inter ni. Ni ne estas senhavaj, ne mankas al ni taskoj.

Unu afero en la libro ne plaĉas al mi, la subtitolo "La tragedio de lia vivo ...". Tio sonas kvazaŭ reklamo por moderna biografio romano, incito al pli malpli sentimentala grandpubliko, kiu nun devas suferi kun tiu aŭ tiu antaŭe indiferenta homo kaj doni al li sian kompaton. Zamenhof ne estus nominta sian vivon tragedio.

*S. Engholm.*

Henriette Roland Holst:  
Roza Luksemburg — ŝiaj vivo kaj laboro. 236 p. form.  
14×20, tole bind. Prezo 2 dol. Tradukis Bas Wels.  
Eldonis SAT.

Jen libro kun enhavopromesa titolo, simpla sed fortika kaj bela bindo, bonaj preso kaj papero. La unuaj linioj estas agrable simplaj kaj facile legeblaj, kaj tia estas la lingvo en la tuta libro. Tamen jam la sepa linio haltigas min: "La patro, la patrino de la infano, kiuj ili estas? Kio estas ilia deveno?"

Sur kio iliaj vivoj sin apogas? Kien ili sin direktas? Kiaj estas iliaj spirita kaj socia niveloj?" Oni povas retorike fari demandojn, sed ĉu troviĝas kontentiga motivo por tia demandado, kiu troviĝas multloke en la libro.

Ankaŭ simpla, korekta frazkonstruo povas havi gravan mankon. Sur p. 3: "Ŝi posedas socialajn sentojn. Humaneco estas la fundamento de ŝia karaktero, la nutrofonto de ŝia imago, la vojmontrilo por ŝia intelekto. Humaneco, plena de tiu viva, sociala sento, kiu ĉe si mem neniam trovas sufiĉon, neniam degeneras al sinkompato, sed spontanee sin direktas al ago. Ĝi konsistas el la volo helpi, servi; ĝi forĝas por si mem el karno kaj scio la ilojn, per kiuj ĝi povas helpi. Malofte multflanka estas la talento de Roza, sed la fakto, ke la diversaj flankoj de tiu talento nature agordiĝas, estas ankoraŭ pli escepta."

Seion tia skribmaniero ne donas. Estas abstraktaĵoj, kiujn nia imago nur fragmente kaptas kaj kiuj malmulte valoras por la racio.

Alia specimeno: "Senfine altvalora ŝajnis al ili la socialismo, sanktigita per la sango de l' noblaj batalantoj. Idealistaj gejunuloj lernis malestime spiti la danĝeron, kiu daŭre ombris iliajn tagojn. Por la plej kuraĝaj la socialismo ricevis nere-zisteblan altirforton." — "Kontraŭ la senkoloriĝo, kiu minacis la laboristan movadon, kontraŭ la plifortiĝo de l' grupigoismo de la laborista burokratio kaj de la privilegiitaj laboristaj kategorioj, Roza Luksemburg konforme al siaj marksismaj sentoj kaj volo, ne povis vidi alian savon ol la revekon de l' malnova malmilda spirito de nerepacigemo, de l' batalo ĝis ekstremo kontraŭ la kapitalisma mondo — la spirito de akra kolero kaj amara indigno, kiu per klarona sonado tratondras la Komunistan Manifeston."

Tio estas ne nur abstrakta sed ankaŭ plena de ŝablonaj esprimoj kaj figuroj. Tia skribmaniero similas al tiu de patriotismaj biografiaj-historiaj verkoj en pasintaj tempoj. Ankaŭ tiu stilo estas ofta, precipe en la komenco.

Libro de tiu speco povas aŭ esti populara, donante informojn al tiuj, kiuj nenion aŭ malmulte scias pri la temo, aŭ esti science historia, donante novajn vidpunktojn, problemojn kaj



solvojn aŭ informojn antaŭe ne konatajn. En tiu ĉi libro aperas homoj, movadoj kaj okazoj rilataj al Roza Luksemburg ĝenerale sen enkondukaj informoj. Ĉu oni rajtas supozi, ke la vasta socialista amaso nuntempa, precipe la junularo, tiel bone konas tiun periodon en Germanujo kaj ĝiajn personojn, ke iom da informado estas superflua? Se jes, ili certe jam antaŭe scias ankaŭ pri Roza Luksemburg same multe, kiom troviĝas en la libro; ion novan rilate al informoj ĝi, laŭ mia scio, ne prezentas, kaj historiesplora prezentmaniero ne troviĝas en ĝi. Se ne, la legantoj kompreneble povas kompletigi per konversaciaj leksikonoj kaj aliaj libroj, sed tiuj, kiuj neniam aŭ preskaŭ neniam scias, ĝenerale ne emas fari tion. Ili aŭ formetas la libron, aŭ la nomoj restas por ili nur nomoj, plejparte baldaŭ forgesitaj.

Mi konsideras miajn suprajn vidpunktojn principe gravaj ne nur ĝenerale sed precipe rilate al la laborista movado. Se abstraktaĵoj, esprimŝablonoj, agitdevizoj kaj difuza sentobazita entuziasmo anstataŭas simplan klaran pensadon kun rekta rilato al la homoj kaj aliaj realaĵoj, kiaj ili efektive estas, kaj se la agado influas ĉefe tiuj faktoroj, tiuokaze estas granda danĝero por la laboristoj. Ja ne ekzistas reala bazo por konsidero kaj agado. La plej granda malutilo kaj detruo al la laborista konstruado de nova socio venis de la laborista movado mem. La laboristmovada tragedio de 1914, de la fino de la unua mondmilito kaj de la tuta tempo ĝis nun ne finiĝis kaj eble ankoraŭ ne kulminis. Kie estas la internacieco ("Proletoj ĉiulandaj unuiĝu!" signifas ja nur, ke oni aliĝu al unu frakcio por kontraŭbatali aliajn), kie egalco, frateco, libereco? El la malfeliĉa stato savos nin neniu vortŝablono pri kapitalismo kaj imperiismo, nek kiom ajn arda sentobazita entuziasmo ĉe milionoj da laboristoj, kiuj staras pretaj sekvi tiun aŭ tiun ideologion, tiun aŭ tiun gvidanton. —

Ŝajnas al mi, ke la libro Roza Luksemburg povas tiurilate influu negative al iuj legantoj, ne pro intenco kaj celado de la aŭtorino sed pro la maniero en kiu ĝi estas verkita.

La partoj en la libro, kiuj sekvas tiun unuan, ŝajnas al mi pli bonaj, certe pro tio, ke la aŭtorino pli multe nur rakontas.

Malgraŭ mia kritiko mi rekomendas al vi aĉeti la libron. Ni havas malmulte da tiaspecaj verkoj en esperanto, kaj eĉ kun siaj mankoj ĝi donas multe da materialo por pripensado.

En la traduko ne plaĉas al mi la ofta apostrofado de la artikolo kaj kelkfoja inversa vortordo, ankaŭ ne la regule uzatajn akuzativojn Kautski-on, Roza-on, Sonja-on ktp. Balla maro certe estas pli taŭga formo ol Orienta maro. La esprimo sur p. 69 "la libro de la Webbs" verŝajne signifas, ke temas pri libro de la goodzoj Webb, sed ĝi estas nek kontentige komprenebla al ĉiuj legantoj nek kontentiga esperanto. Tiuj kaj kelkaj aliaj detaloj tamen estas negravaj flankaĵoj. Cetere la lingvo ŝajnas al mi bona, multfoje bonega.

*S. Engholm.*

Somera Universitato, Malmö 1948.  
Eldonita por Universala Esperanto-Asocio de The Esperanto Publishing Co. Ltd.  
Prezo 4 ŝil. aŭfranko 2 p.  
Aĉetebla pogrande ĉe The Esperanto Publishing Co.,  
detale ĉe landaj libroservoj aŭ ĉe UEA.

Tiuj prelegoj meritas la preson. Ŝajnas al mi, ke ĉiu esperantisto povas legi ilin kun profito kaj ĝuo, ankaŭ tiuj, kiuj iam aŭskultis ilin. La stilo ĝenerale estas bona paroladstilo, sen longaj kaj komplikitaj frazoj. La prelegistoj estas eminentaj fakuloj pri siaj specialaĵoj, sed ili estas ankaŭ eminentaj prelegantoj por ĝenerala publiko. Por iom progresintaj lernantoj tiu prelegkolekto nepre estas bonega legolibro, kun tre interesa kaj varia enhavo.

Enketo pri Internacia helplingvo.  
Eldonita de Sveda Esperanto-Federacio laŭ peto de Universala Esperanto-Asocio.  
Havebla kontraŭ 5 rpk de la eldonejo, adr. Tegelbacken, Stockholm, Svedujo.

La enkonduko de tiu broŝuro diras la., ke "por akceli la mond-uzadon de unu sola helplingvo, kiel komprenilo inter ĉiuj homoj diverslingvaj, kaj por subteni enkondukon de instruado de helplingvo en ĉiujn lernejojn, "Internationaj Language Association" (IALA), kies sidejo estas en New York (USA), organizis vastan esploradon, en kiu partoprenis la Instituto J.-J. Rousseau (Insti-

tuto de Eduk-sciencoj) en Genevo (Svislando). La tiama direktoro de l' Instituto J.-J. Rousseau, Profesoro Pierre Bovet, helpata de unu sekretariino, kondukis mem tiun ĉi laboron." Multe da atentindaj faktoj kaj analiza statistiko, valora precipe por instruistoj kaj propagandistoj, interesa por ĉiuj.

*S. Engholm.*

#### KOREKTOJ.

En nro 3/49 p. 9, l. 10 legu anst. konataj estus — konataj soldatoj estus; p. 10, l. 13 Gazmorton — gasmorton; p. 12, l. 13—14 komenciĝu — komencu; p. 16, l. 3 de mals. progmatikulo — pragmatikulo.

Por tiu ĉi nro venis nova germana letero, kiu kritikas tiujn vidpunktojn, kiujn prezentis la germana letero en nro 3. Mi tre bedaŭras, ke ne estis eble aranĝi lokon por ĝi en tiu ĉi nro. Ĝi aperos en la venonta nro, same kiel kelkaj aliaj debatpunktoj, kiujn mi devis prokrasti.

*S. E.*